# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 9 Septembro, 2011

*Kara Leganto, se la lasta somera n-ro de nia bulteno aperis iom malfrue, la septembra (male) aperas komence de la monato.Kaj, denove male, ĝi ne estas tiel malĝoja, kiel du lastaj, eĉ – iom da serioza. Sed prijuĝu mem. Restu daŭre kun ni. Dankon!*

–La Redakcio

## UK en Kopenhago

Mi partoprenis la UK-on kaj la ILEI-konferencon dum la antaŭa monato en Kopenhago. Mi estas tre okupata kaj ne povas verki vastan raporton, sed… Ĉeestis 1450 homoj de 66 landoj. La vetero ne estas agrabla. Estis multe da nuboj kaj ofte pluvetis. La unua agrabla tago estis merkredo, la tago por ekskursoj. Eble la plej signifa afero estis, ke multaj partoprenantoj venis el Aziaj landoj kaj la konstato, ke la estonteco por Esperanto multe dependas de Azio. Dum la venonta jaro la ILEI-konferenco estos en Kunming, Ĉinio kaj la UK en Hanojo, Vjetmanio. Mi aldonas kopion de la prelego, kiun mi prezentis dufoje: ĉe la ILEI-konferenco kaj ĉe la UK *(la redakcio prezentas resumon de la prelego kaj foton de s-ro Ron kun E-instruistoj de Afriko, Eŭropo kaj Azio).*

–D-ro Ronald Glossop, Profesoro Emerita
Sud-Ilinojsa Universitato en Edwardsville

## Kial Ĉinio Estas Fekunda Kampo Por Instruado de Esperanto

Ĉu Ĉinio estas bona loko por instruado de Esperanto? Esperanto estas okcidenta lingvo, kiu multe pli similas al plejparto de lingvoj de Eŭropo ol al la ĉina. Tial ŝajnas, ke ĉinoj probable ne povus tiel facile kaj tiel rapide lerni Esperanton kiel Okcidentuloj. Tamen mi volas argumenti ke nuntempe Ĉinio estas fekunda kampo por la instruado de Esperanto. Kial?

Unu kialo estas, ke la registaro de Ĉinio estis kaj estas ĝenerale pli helpema al Esperanto kaj Esperantistoj ol aliaj landaj registaroj. En Ĉinio la landa registaro subtenas la eldonadon de revuoj kaj magazinoj. Oni povas legi, aŭdi kaj vidi Esperantajn dissendojn ĉiutage per <http://esperanto.cri.cn/> kaj <http://www.espero.com.cn>. La registaro dungas multajn homojn (eĉ eksterlandanojn) uzi Esperanton en sia ĉiutaga laboro. Kiuj aliaj landaj registaroj elspezas tiom da mono por subteni la uzon de Esperanto?




Dua kialo instrui Esperanton en Ĉinio estas la kvanto de homoj, loĝantaj en tiu lando. 1,34 miliardo da homoj! Preskaŭ unu el ĉiuj kvin homoj sur la planedo loĝas en Ĉinio. La influo de Ĉinio en la mondo kreskas, do estus bona afero por Esperanto, se multaj ĉinoj uzus ĝin.

Tria grava kialo estas la fakto, ke nun en Ĉinio ĉiuj infanoj devas lerni ununuran oficialan version de la skribita lingvo: ili devas lerni uzadon de fonetika latina alfabeto. La principo estas simila al la skribita flanko de Esperanto.

La kvara kialo, ke Ĉinio estas fekunda kampo por la studado de Esperanto: nun en la lando geinfanoj kaj gejunuloj devas studi la anglan. En la neanglaparolantaj okcidentaj landoj oni ĝenerale opinias, ke en la lernejoj ekzistas konflikto inter la studado de la angla lingvo kaj la samtempe studado de Esperanto. En tiu situacio oni povas opinii, ke la angla (kaj ankaŭ aliaj naciaj lingvoj) estas iom malamiko aŭ rivalo de Esperanto. Tamen por ĉinoj la lernado de la angla kaj la lernado de Esperanto efektive helpas unu la alian en diversaj manieroj! La lernado de Esperanto helpas rilate al la lernado pri la gramatiko de la angla. En la angla lingvo la gramatiko ofte estas neevidenta aŭ eĉ kaŝita, sed Esperanto povas klarigi la aferon.

La tria maniero en kiu por ĉinoj la studado de la angla lingvo kaj Esperanto helpas unu la alian rilatas al la interpunkcio kiu estas malsama ol en la ĉina. La interpunkcio estas tre simila en la skribata angla lingvo kaj skribata Esperanto. Oni nun ofte uzas la skribatan lingvon por retmesaĝoj kaj presitaj materialoj. Sekve la kapablo ĝuste uzi la interpunkcion estas grava afero.

Jam ekzistas en Ĉinio elementa lernejo, kie infanoj studas Esperanton antaŭ ol ili studas la anglan, nome, la lernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan. Tie la lernejestro WEI Yubin (Jado), volas montri al la ĉina registaro, ke infanoj pli bone kaj pli rapide lernos la anglan, se ili antaŭe lernis Esperanton.

Tamen mi opinias, ke en Ĉinio eĉ la nuntempa postulata lernado de la angla lingvo helpas rilate al la lernado kaj uzo de Esperanto. La ĉina lingvo estas tiel malsimila al eŭropaj lingvoj, ke lernado de okcidentaj lingvoj (eĉ Esperanto) estas tre malfacila afero por ili. Sekve eble ne multaj ĉinoj libere decidus peni lerni tiajn lingvojn. Sed kiam gejunuloj devas lerni la anglan en lernejoj, ili sekve havas bonan bazon por lerni Esperanton. Plue post kiam ili studis la anglan kaj eĉ ekrigardas Esperanton, ili tuj konstatas, ke Esperanton estas multe pli facile lerni. Sendube en Ĉinio la angla lingvo estas multe uzata, sed por multaj ĉinoj la scipovo de ĝi estas tute pasiva. Multaj el ili povas iom legi en ĝin, sed ne povas paroli ĝin aŭ bone skribi. En Ĉinio kelkaj Esperantistoj unue lernis la anglan kaj poste konstatas, ke pro tio ili povas pli facile lerni kaj uzi Esperanton. Samtempe ĉinoj, kiuj jam lernis Esperanton, povas informi aliajn samlingvanojn pri la utileco de Esperanto rilate al lernado de la angla.

Por eltrovi, ĉu ĉinoj konsentus kun miaj ideoj pri la rilato inter lernado de la angla kaj lernado de Esperanto, mi antaŭe rete sendis kopion de mia simila prelegeto al GONG Xiaofeng (Arko), profesorino en Nanĉang Universitato en Ĉinio. Jen ŝia respondo: “Mi tralegis vian artikolon. Mi tute konsentas kun vi. Temas pri mia lernado. En la komenco la angla lingvo multe helpis mian lernadon de Esperanto. Esperanto [ankaŭ] multe helpis mian relernadon de la angla, kiam mi preskaŭ forgesis la anglan lingvon antaŭ 20 jaroj. Dum lastatempaj jaroj mi trovis, ke mia aŭdkapablo de Esperanto plialtiĝis kaj pro tio mi ankaŭ rimarkis, ke la aŭdkapablo de la angla lingvo sinsekve altiĝis multe. Do, vi estas prava.”

Mi ne estas la sola Esperantisto, kiu opinias ke Ĉinio estas fekunda kampo por la instruado de Esperanto. Prof. Dennis Keefe jam instruis dum du jaroj ĉe la Universitato de Nankino. Li bone kunlaboras kun aliaj instruistoj de Esperanto en Ĉinio. Li nun organizas Universitaton de Esperanto ĉe la insulo Hajnano. La plano estas okazigi kutimajn 40-horajn universitatajn kursojn por lokaj studentoj, kiuj jam lernis Esperanton. Ili ne nur studos Esperanton. Ili uzos Esperanton por lerni pri aliaj aferoj. Dennis konsentas kun mi, ke Ĉinio estas bona loko por instrui Esperanton.

Mi ankoraŭ opinias, ke en Ĉinio la plej bona sistemo estus instrui Esperanton unue en la elementaj lernejoj kaj poste la anglan, kiel oni jam faras en la elementa lernejo en Taiyuan. Tamen mi opinias, ke estas bona ideo instrui Esperanton en Ĉinio ankaŭ en la universitatoj post kiam la gejunuloj jam devis studi la anglan lingvon.

---

## El Nia Leterkesto



Karaj miaj, pardonon, ke mi dum longa tempo ne donis al vi vivsignon el Koreio, kiun mi revenis antaŭ kelkaj monatoj. Mi kaj mia familio bonorde revenis hejmlanden aprile, kaj reveninte hejmlanden, mi rekomencis mian malnovan klinikon kaj nun ĉio estas en ordo. Mia vivo dum 6,5 jaroj en Usono nun restas ĉe mi ne forgesebla memoraĵo en mia vivo. Kaj el tiuj memoroj vi kaj Ŝikaga E-asocio estas grandparto por mi. Mi dankas, ke vi daŭre sendas al mi la bultenon, Saluton!, kiu klare rememorigas al mi la belajn tempojn en Ŝikago.

*–Via amike, Puramo*
*Ĉong el Koreio, Vic-Prezidinto de la ESdŜ*

---

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the
Esperanto Society of Chicago,
and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

## KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

27an de Septembro – memorkunsido dediĉita al Walter (Wladyslaw) Cebulski kaj Karlo Offutt

25an de Oktobro – Tutmondo Ŝikage (gvidas d-ro Kordylewski), bv prepari informon pri la etnaj anguloj de nia metropolo

22an de Novembro – la temoj estos anoncataj

18an de Decembro – Zamenhofa Bankedo